

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Nova titolo post 1 januaro 1925: „Heroldo de Esperanto“.  
Aperas dufoje en la semajno (merkredo kaj sabate). — Prezo de unuopa numero 0.20 sv. fk. aŭ egalvaloro.

### Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W.M. Page, advokato, Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
I. Gili Noria, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-  
direktoro, Kaunas.

N-o 227  
24. 12. 1924

Redakcio:  
Cefredaktoro: Teo Jung.

Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:  
Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo pomenara  
de duona semajna ekspedado: egal-  
valoro de 0.20 sv. fk., mendita per  
loka postoficejo 0.15 sv. fk.,  
de semajna ekspedado (du numeroj  
kune): 0.15 sv. fk.

Anonprezo  
po unucentimetra kolonero egalvaloro  
de 2.— sv. fk. (antaŭpage 1.50 sv. fk.),  
minimuma alteco 5 cm.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris Warszawa.

## Pioniroj de la civilizacio.

### Eltrovintoj kiel subtenantoj de paca evoluado.

Ĉie, kie loĝas homoj civilizitaj, regas la volo al teknika kaj arta formado de la materio. Ĉe konstruado de domoj, mebloj, veturiloj, en la tuta vestifara industrio tia volo aperas en diversaj formoj. Ĉiam kaj en ĉiu rilato la kreanto kaj elpensinto montriĝas kiel pioniro de laborebloj kaj labormanieroj, do kiel konstruanto de l' homara kaj paca fundamento.

Elpensado povas malhelpi la unuecon de l' homaro; perfektaj kaj harmoniaj formoj, ritmaj koloraj ondaj substrekas la ordigantan influon de verkoj de elpensintoj al la homaro. Ni do povas konstati — speciale sur teritorio, kie ĉiu homo ĝenerale konscie aŭ senvole prezentas sian animan kaj spiritan internon: la vestado — solecon, sorbadon de la interesoj de l' kunvivantoj per unuforma formo, kaj sentas tuj la varmon kaj simpatian, kie kolora harmonio kaj arta forindono regas la vestojn.

Oni do plenrajte diras: „la regino Modo“. Kaj ni devas samrajte nomi kreantojn de harmoniaj kostumoj ktp. amikoj de esperantismo kaj homa paco, ĉar iliaj verkoj parolas lingvon al ĉiu kompreneblan, fortaj kaŭzaj protektantoj de esperantistaj celoj, servantoj en regno de forto konstruanta.

Tiuj faktoj estis tro flankenmetitaj en diskuto kaj socia paca unuigo. Oni malestimis la fundamenton de la civilizacio kaj kulturo, kaj la milito disrompis la pacon, ĉar la pacajn intertraktojn la eltrovintoj kaj konstruantoj de la fundamento de l' paco metis eksteren de la diskuto. Ni pacaj batalantoj havas la devon aliri la eltrovintojn kun ĉiuj iliaj kapabloj al nia verko. Tio plej bone ebligas la fundon al la paca interkomprenado de popoloj kaj individuoj. De la eltrovintoj povos veni grandega forto al la esperantista movado, se la gazetaro kaj esperantistaro akceptos labori en tiu direkto.

Kreantoj, kiuj majstras la teknikojn de diversaj medioj, estas fortopovaj batalantoj de l' esperantismo, eĉ ne konante Esperanton. Sed se ili estas ankaŭ veraj esperantistoj, jes pli bona, des pli forta ilia influo al paca evoluado. Kreantino originala de moderna vestifara arto *Maya del Roma*, kiu sin prezentis en griza epoko al la publiko kun propraj poemoj ilustrantaj la idealan sencan de ŝiaj persone kreitaj modeloj, majstris pentrarton same kiel labormanierojn de ŝtofoj ĉiuspecaj, kaj pro tio ŝiaj modeloj havis tiel sukcesplenan influon sur la kunigon de medioj najbaraj aŭ sin kontraŭbatalantaj. Ŝi estas esperantistino! La arta noto de la vestifaradaj medioj en jaroj post la malfeliĉa milito estis esperantismo sen lingvo parolata, ĉar ĝi efektive forigis la barojn, kiuj disigis tiun parton de l' homaro, kiu laborante mane, anime kaj spirite konstruas la fundamenton de homara paco. Ni havas la devon, prezentiti la originalan kreantinn *Maya del Roma* kiel samdeaninon kaj faman, modele verkan pioniron de l' paca interŝanĝo de ideoj kaj verkoj.

Inĝenieroj, elpensantoj kaj kreantoj de arto estas kolonoj de templo de popolaj interrilatoj, kaj la vico de ni ĉiuj estas, formi en peresperanta ago la tegmenton. Ila influo (kiel gvidantoj de l' faka evoluado) garantias rapidan venkon de praktika utiligo de nia lingvo. Ili verŝas en epokoj de suferoj konsolantajn agojn, montrante vojon al luma epoko. Ne estis sensenca eksterato, se *Maya del Roma* kolorigis per ŝtofo kaj koloro la kostumojn de l' virinaro; profunda anima kunsentado kun la doloroj de l' homoj premitaj per milito kreis tiujn modelojn, kies varmo kaj harmonio metis ĉiujn portantojn en ondon de kunsentado kaj goja komuna evoluo al altaj celoj. Maya-

kreajoj fondis industriojn por materialoj, kiuj anstataŭe eĉ ne estis konataj. Artistoj fariĝis kunhelpantoj al metianoj, eĉ gvidistoj de unueca metia laboro.

En sama maniero ni intencas prezenti al la publiko peresperante pluajn modelajn eltrovojn kaj eltrovintojn. Kreajoj de arto estis iam senutila aldono al la vivo. Per *Maya*-modeloj arto fariĝis fama forto kaj fundamento de la komuna laboro de ĉiuspecaj medioj.

Komponisto Richard Wagner uzis lingvon internacian: la muzikajn teknikojn kaj instrumentojn. Li alcelis kaj atingis plej bonan, fortegan esprimon de ideoj de komponisto. *Maya del Roma* intencis

la daŭraj kaj kelkatempaj esceptoj. Sekvas informoj pri la administrado de la leĝo.

La tria parto de la studo pritraktas defale la kolektivajn kontraktojn pri laborhoroj.

Inter la landoj jam ampleksitaj de tiu serio de eldonaĵoj de la Internacia Labora Oficejo estas Belgio, Francujo, Germanujo, Granda Britujo, Italujo, Nederlando kaj Svislando.

## Scienco.

### Elektro kiel piloto.

La plej danĝeran malamikon de maristo, la nebulon, ĝis nun oni kontraŭstaris preskaŭ senpove. Ĉe nebulo al la ŝipisto mankas ĉiu orientilo. Certe oni povas per sonsignaloj subakvaj malgravigi la danĝeron. Sed ĉi tiuj helpiloj ankoraŭ estas konsiderinde neperfektaj kaj aplikablaj nur en certaj distancoj mallongaj. Precipe granda fariĝas la nebuldanĝero, se oni estas pilotonta al enmarigoj de riveroj. Tie pro malfacilaĵoj ĉe la sinorientado ŝipoj emas surbordiĝi kaj alrifiĝi. Tial la ŝipistoj ofte preferis en tiuj okazoj senmove restadi, per tio kompreneble perdante multvaloran tempon.

Ankaŭ en ĉi tiu embaraso ekstaris elektro kiel helpanto.

Kablo estas metata sur la marfondon laŭlonge de la ŝipveturejo provizore ne pli longa ol 40 marmetrojn. Ĝi ebligas al la ŝipoj eĉ ĉe nebulveturo sendanĝere enveturi en la havenon. Laŭ la ĵurnalo „Industrie und Technik“ oni aplikas izolitan, plurdratan kablaron, kiu estas trafuita de alternfluo de ĉ. 550 periodoj posekunde. La kablofinajo libere kuŝanta en la maro estas kelkajn metrojn senigata de la izolilo kaj alterigata per plataĵo. Je la alia finajo la kablo post intermetado de klavo estas kunigata kun la poluso de alternflua generatoro, kies alia poluso same estas alterigata. La alternfluo produktas magnetan fortolinaron ĉirkaŭ la kablo. Per ĉi tiu en ĉiu dratvindaĵo, kiun oni enigis en fortolinaron, estas induktata elektro per alternfluo, kiun oni povas aŭdebligi en telefono.

Se oni do sur ĉi ŝipoflanko en konvenaj formo kaj loko aranĝas fiajn vindaĵojn kunigitajn kun telefono, oni povas per la sonforteco konstati la situacion de la ŝipo. Tiel ekipita ŝipo do povas „laŭlonge de la kablo“ enveturi sendanĝere en la havenon.

El „Naturwissenschaftl. Korresp.“  
Fr. Frickhinger, München, N. W. Z.

## Malfeliĉo pro uragano.

La 9. 11. tra norda kaj nordokcidenta parto de Kaspia Maro furiozis malofa por tiuj lokoj uragano, alportante grandan malfeliĉon al la regiono.

Ĝis tagmezo de 9. 11. la vetero estis bona kaj varma. Posttagmeze subite aperis forta ventego, kaj la temperaturo falis sub nulon. Pro la aŭtuna sezono de fiŝkaptado kaj la bela vetero plejparto de la fiŝkaptista loĝantaro eliris maren. La nombro de l' fiŝkaptistaj ŝipoj kaj ŝipetoj estis ĉ. 5000.

Subita uragano, blovinta maren la 10. 11., jam aperigis ĉe la bordoj de l' maro amasojn da glacio kaj malpermesis al la ŝipoj, baraktantaj kontraŭ la furiozanta ventego kaj kovritaj per glacio, aliri bordojn aŭ riverojn por sin savi. Ili aŭ estis frostigitaj, aŭ devis naĝi pli maren, forjetante siajn fiŝkaptilojn kaj fiŝojn.

Astrahana Gubernia Ekzekutiva Komitato tuj organizis eksterordinaran komision, kiu kun kelkaj vaporsipoj, preninte provizojn da nutraĵo kaj lignaĵo, eliris tra Volga Kanalo maren kaj komencis



*Maya del Roma,*  
kreantino originala de moderna vestifara arto.

kaj atingis samon erilato de metia esprimado de ideoj. Sekvu ŝian ekzemplon, montritan per ŝiaj en ekspozicio kunigitaj verkoj, ĉiuj eltrovintoj! Aliĝu ankaŭ ili al Esperanto!

(La aŭtoro de tiu ĉi artikolo permesas kaj eĉ petas, traduki kaj publikigi ĝin en naciaj ĵurnaloj.)

## Socia vivo.

### Laborhoroj en Ĉeĥoslovakio.

El la industriaj ŝtatoj de Eŭropo, kiuj starigis per leĝdono la okhoran labortagon, la unua, kiu konfirmis la okhoran Konvencion de Washington, estas Ĉeĥoslovakio.

Raporto pri laborhoroj en Ĉeĥoslovakio estas juseldonita de la Internacia Labora Oficejo.

La unua parto de la eldonaĵo pritraktas la leĝon de 1918, per kiu la okhora tago aŭ 48-hora semajno estas starigita en la Respubliko.

La broŝuro dediĉas specialan atenton al la metodoj por apliki la leĝon al la fervojoj kaj al

la savadon de l' fiŝkaptistoj, mobilizinte ĉe la mara rodo ĉ. 20 aliajn vaporsipojn por tiu celo.

Dum unu tago ili savis pli ol 1000 ŝipojn kaj boatojn. Bedaŭre, la ventego forpelis la akvon de la bordoj, malprofundigante la maron tiuloke, kaj multego da ŝipoj kaj boatoj ne povis ricevi la helpon. Tiuj ŝipoj parte estis „trancataj“ per la glacio, parte rompataj per la amasiĝinta glacio. La vaporsipoj laboris seninterrompe, kaj ilia servantaro montris grandan heroecon, havante la situacion de nordpolusa vetero.

Kun granda risko kelkaj vaporsipoj vizitis la danĝerajn lokojn, prenis homojn de la ŝipoj kaj boatoj kaj disdonis la provizojn de la restintoj kun siaj ŝipoj, ĉar tiuj estis iliaj solaj fontoj de ekzistado.

Ĝis 27. 11., malgraŭ trankviliĝo de l' ventego kaj aliiĝo de l' temperaturo, multaj centoj da ŝipoj kaj boatoj kun siaj havantoj ne revenis helmen. Kelkaj personoj estis trovataj frostiĝintaj (ligitaj al la mastoj de siaj ŝipoj). Multego da fiŝkaptistoj revenis sen siaj fiŝkaptiloj kaj alia havaĵo.

En 1914 en la sama regiono estis simila frost-ventego, kiu donis tiam al la loĝantaro malfeliĉon; sed la nuna malfeliĉo pro la uragano, aldone al nunjara kampara malbonega rikolto kaj post multe da aliaj malfeliĉoj, antaŭnelonge pasintaj, sendube estos pli sentleba por la loĝantaro.

Astrahana fiŝindustrio, kiu laŭ sia amplekso havas gravan rolon en la ekonomia stato de S. S. R., pro la malfeliĉo perdas multe. Tion konsideras la centra registaro, kaj ĝi jam starigis la demandon de urĝa kaj efektiva helpo al la fiŝkaptista loĝantaro de astrahana kaj aliaj apudmaraj lokoj, kiuj vizitis la malfeliĉo.

Malgraŭ tio estas bezona ĉia helpo de ĉiuj laboruloj.

S. Sarfiev, Astrahan, Kanava 111.

**Radio.**

Radioakustiko

estas la unu de novaj aplikadoj de la T. S. F. (Telegrafado sen Fadenoj). Ĝi ebligas al ŝipoj kaj aerŝipoj la determinadon de la voiaĝdirekto kaj la precizan orientiĝon. La angla hidrografia servo utiligis tiun ĉi procedon kun bonaj rezultatoj, kaj la granda aerŝipo Z. R. III, dum sia veturo de Germanujo al Ameriko, direktiĝis ankaŭ laŭ tiu ĉi maniero.

J. M. Paris.

**Memore al s-ino Zamenhof.**

La parolado de s-o Leo Belmont ĉe la ĉerko de la kara mortintino.

Funebraj aŭskultantoj!

Jen ŝi foriris per la lasta vojo, per kiuj ni ĉiuj pli rapide aŭ malrapide foriros. Kaj nun — la vivantoj, en momento de ŝia enterigo, devas pripensi, kiu ŝi estis dumvive kaj kiu ŝi devas resti en la memoro de generacioj. En la historio de la homa penso okupita per kreado de la spirita telegrafo ni, kiuj kunvenis ĉe tia kara por ni ĉiuj korpo, vere travivas momenton solenan, kiu dum longaj centiaroj ne ripetigos. Ni ja havas la honoron enterigi la patrino de Esperanto.

Esperanto estas spirita telegrafo, kiu ligas la tutan homaron dispecigitan sur la tuta terĝlobo kaj plenumas tre altan kaj gravan rolon, ĉar ĝi alproksimigas la homojn inter si. Kaj kion alportis al ni aliaj eltrovaĵoj? Aeroplanoj dum la milito ĵetas bombojn kaj grenadojn, la vagonaroj alportas armeojn, kiuj sin reciproke malamas kaj deliras. La signoj de la Morse telegrafo, kvankam per samspecaj elektraj ondoj stampitaj, tamen staras tradukitaj je diversaj lingvoj kaj forigas la abismon inter la popoloj.

Jam la tero tomba forprenis al ni senkonsole la spiritan patron de Esperanto D-on Ludovikon Zamenhof, kaj denove evide ĝi atendas alian oferon; tio estas, funebraj aŭskultantoj, vundo simbola, kiu trafrancas la korojn de ĉiuj esperantistoj, en kies nomo mi havas la honoron ĉi tie paroli.

La saĝa leĝo volas, ke vira semo tiam ekĝermu, kiam ĝin varmigas la sino de l' virino, kaj ĝi povas pereji, se ne troviĝas la amata koro de kara edzino; sed feliĉe tiu koro troviĝis, ĉar aperis virino forte amanta ne nur la korpon de l' kara edzo, sed ankaŭ lian animon kaj genian penson. Ŝi ne nur helpis al li spirite, sed el ŝia granda koro, materiale en lia granda laboro, ŝi multe helpis al li, oferante tutan sian tempon al lia granda estont-eltrovaĵo kaj helpante disvastigi lian verkon. Ŝi partoprenis en liaj triumfoj kaj sukcesoj kaj vizitis kun li ĉiujn esp. kongresojn; ĉar ĉie, kien li nur venis, li estis akceptata kvazaŭ monarko. En Franca Respubliko oni lin akceptis ĉe l' sonoj de la Marseljezo, en Cambridge Akademia Korpuso Universitata honoris lin triumfe, la hispana reĝo Alfonso oferis al li ordenon de Izabelo Katolika, kaj en Antwerpen oni eljungs la ĉevalojn, kaj studentoj tra la tuta urbo iris la kalesojn kaj honoris lin entuziasme. En Kraków-a kongreso dum ekskurso al Wieliczka, konata pola salminejo, oni lumigis ĉiujn elektrajn lumojn kaj faris specialajn iluminaciojn. Zamenhof estis ankaŭ unu el genioj pensuloj, kiu jam dum la vivo havis monumenton en fremda lando: en Franzensbad. Kaj nun — ĉiuj esperantistoj de la tuta terĝlobo volas ankaŭ honorati la neforgeseblan memoron per starigo de tombonumento por montri al la meritplena sian dankon.

Klara Zamenhof dividis kun sia edzo ĉiujn triumfojn kaj zorgojn; ŝi estis, verdire, sindonema patrino de ĉiuj esperantaj societoj. D-o L. L. Zamenhof foriris en nekonatan misteran postomban vivon por eterna ripozo, li foriris en landon, kie ne ekzistas la diferencoj inter la rasoj kaj konfesoj, en landon, kie regas eterna harmonio. Li estis vera apostolo de l' amo kaj paco, promesante kaj alportante al la tuta disbatita homaro pli bonan kaj trankvilan vivon, li promesis ne militon kaj malamon, sed dank' al lia genia eltrovaĵo li volis kunligi kaj unuigi ĉiujn spiritalajn homajn sentojn. Kaj jen Klara Zamenhof ankaŭ plenumis gravan rolon en la historio de l' homaro, ĉar ŝi estis parieto spirita de sia granda edzo, dank' al ŝi li brave kaj kuraĝe iris antaŭen, kaj ŝi lumigis al li la vojon.

Kaj venos la horo, kiam ĉiuj reprezentantoj de la tuta mondo pilgrimos al la tomboj de sanktaj kaj gravaj cerboj, por frate kaj amike labori por estontaj generacioj. Dormu do, gemajstroj Zamen-

hof, trankvile kaj kviete, ĉar venos la tago, kiam la homaro ekkomprenos vian gravan rolon en progreso de l' homaro kaj oni honoros vin laŭ vian meriton.

Tiu tago venos!

*Korekto.* En la artikolo en n-o. 226 pri „La lastaj tagoj de s-ino Klara Zamenhof“ estas erare sciigita, ke post la kongreso de Vien s-ino Z. vojaĝis al ĉeĥoslovaka banloko. Kiel ni nun sciigis, ŝi estis en Trentino por serĉi resaniĝon.

**Provizora bilanco**

de 16-a Universala Kongreso Wien 1924.

1. Enspezoj:

1. Kotizoj de kongresanoj	252,004,780
2. Donacoj	17,076,644
3. Kongresafaj venditaĵ	12,944,017
4. Rajtoj pri vendado k. c.	18,600,600
5. Enspezoj el arangoj	40,557,000
<b>Sumo</b>	<b>341,185,041</b>

2. Elspezoj:

A. Kongres-organizo.

1. Kongres-oficejo (instalo, salairoj al oficejoj, poŝtfranko, helpantoj dumkongresaj, aŭŝio)	68,800,000
2. Kongresejo (luado, lumigo)	74,000,000
3. Presaĵoj (invitoj aligiloj, kongreskartoj, insignoj, kongreslibro, kongresadresaro, kongresbulleteno, markoj, kontrolbezonaĵoj)	168,600,000
4. Memoriabulo Zamenhof	3,200,000

B. Amuzaĵ arangoj.

5. Koncerto, teatro, kabaredoj (kontraktoj kun artistoj kaj pri prezentadoj)	158,700,000
6. Ĝardenfesto, ekskursoj	56,900,000
7. Dekoracioj (standardoj, bonveno, instalejoj, ekspoz. programoj)	45,400,000
<b>Sumo</b>	<b>558,600,000</b>

Enspezoj	341,185,041
Elspezoj	558,600,000
<b>Nepagita resto</b>	<b>214,416,959</b>

O. Zimmermann, financesiro R. Hoeschek, J. Schamanek revizoroj.

La unua alvoko de L. K. K. Wien pri helpo al la kongresa kazo rezultigis, ke ĉ. 100 samideanoj sendis entute ĉ. dekonon de la bezonata sumo. Dua alvoko ĵus estas dissendita ĉirkaŭ la L. K. K. deklaras, ke ĝia adreso ankoraŭ estas: Wien VI, Mollardgasse 55, kaj ke, krom tio, ekzistas dua, pli simpla adreso: Esperanto-Kongreso Wien 56.

**Kroniko.**

Por servi nian loĝantaron per ĉiam aktualata, ninata kaj komplete informaro, ni bezonas sciiĝojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unu-Banke siberia, sed ne inter administraciistoj aŭ privataj sciiĝoj) pri ĉiuj novaĵoj el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidele, legeble (precipe nomoj).

**Britujo.**

Lancashire kaj Cheshire Federacio

havas sian proksiman ĵarkunveno en Wallasey, Liverpool, la 31. 1. 1925. Programo: Sabato 15 h. (3 h. p.m.) kunveno en Urdomo, kie la urbesisto bonvenigos la delegitojn de la div. urboj; vespere prop. kunveno, koncerto ktp.; dimanĉe je 16 h. (4 h. p.m.) diservo en Preĝejo S-ta Nikolao, Wallasey. Ni deziras amasan partoprenon, ĉar oni intencas elekti kiel prezidanton s-on Prof. COLLISON de la Universitato Liverpool. Adreso: F-lino Dunkwales, 55 Pickup Street, Clayton-le-Moors, Lancashire.

Sub neĝkovrilo etaj domoj. En dometoj multaj homoj. Sufertantoj. Nun dormantaj. Songantaj pri vipo kaj bajoneto. Pri ekzilo siberia.

En Carskoje Selo. Fiera cara palaco. Brila fenestraro. Gaja societo. Inter multaj belulinoj jen la caro. Profetino. Profetanta . . . „Cara Moŝto. Donu manojn! Tiuj sulkoj sur manplato — multa ĝojo. Reĝta linio — energio. Fremda sango — regado longa . . . regado longa,“ ripetas la profetino, delasante manon moŝtan. La profetinaj okuloj rigardas en la aeron. Kaj aŭdiĝas voĉ' mistera . . .

„El la gento de Davido naskiĝos infano stranga. Sub la signo de la stelo . . . Li eltrovos novan lingvon . . . Kaj la rusaj oficeroj komprenos regatojn litovajn. Kaj la caraj armeanoj el polaj knaboj rekrutitaj ne plu batos la hebreojn strange fremde parolintajn. Car tiu juda sorĉisto sorĉos animojn soldatajn de diversaj nacioj . . . Kaj ĉies koroj akordiĝos samrite per nova lingvo amoporta. Kaj ruiniĝos imperio. Krono falos. Sango, san . . .“

„Sufiĉe!“  
Kaj Lia Moŝto retiriĝas. Forlasas la societon. Kaj baldaŭ li ekdormas. En la mola, silka lito. La caro de ĉiuj rusoj . . . Maltrankvila sinjetado de la korpo atestas pri aĉa sono. Moŝto ĝemas . . . Jen li vidas gajan dancon, virinojn kaj oficejojn, jen li vidas la subulojn malkontentajn. Ho, feturo! . . . Brakoro lin minacanta, ribela popolamaso . . . Uniformo policista. Vipokrako, pafoj, veoj. Homoj falas, homoj staras. Unu malaperas, sed alia venas. Centkapa popolo-hidro. Krioj akraj, krioj rakaj . . . For la caron! Mortu caron!  
Frumatene. Vekiĝas caro. Svita frunto, laca okulparo. Kaj hirta hararo.  
„He, vi, bestoj, adjutantoj, aŭskultu min: la ordonon pri pogromo afiŝigu hodiaŭ! Kurieroj

**La ponto trans la Tay.**

De Theodor Fontane.

„Kiam renkontiĝos ni tri?“  
„Je la sepa sur ponto kunvenu ni!“  
„Ĉe l' mezpiero.“ — „La flamon mi estigos.“ — „Mi asistos vin.“  
„Mi venos el nord.“ — „El sudo min Venigu!“ — „El mar' min!“ — „Ni petoladu: La ponton en akvon ni nenversadu!“  
„Kaj la vagono“, la ponton tuŝanta.  
„Je la sepa hor?“ — „Estu kunaleganta.“  
„Ha! ha!“ — „Nenio estas, nura ludil!“ — La formitaĵo de homa fl!“

Sur la norda flank' pontista dom' staras,  
— La fenestroj ĉiuj al sudo rigardas —  
Kaj la geponistoj pro maltrankvil'  
Vidadas suden je la fl';  
Car la vent' estas pli furiozanta,  
Kaj jen! kvazaŭ foj' de l' ĉiel' falanta,  
Superake ekluo terure bela . . .  
Jam estas ree nokto malhela.

Trad. Steding, Bremen-Horn.

**Sub la stelo.**

De Tiberio Morariu.

Cap. II. 9.  
... kaj, jen, la stelo antaŭiris  
kaj staris super la loko, kie estas  
la juna knabeto.

Cap. II. 16.  
Tiam Herodes tre koleris kaj  
sendinte mortigis ĉiujn knabojn  
en Belchem kaj en ĉiuj ĝiaj  
ĉirkaŭaĵoj . . .

Evangelio laŭ Sankta Mateo.

1859.  
Decembro.

Blanka neĝo sur la stratoj de la rusa ĉefurbejo. Aro da gliveturiloj. Tinta sono sonorila. Riĉuloj en karaj peltot. Jen mujkoj ĉifonitaj almozetpas, poste ili varmigas en la drinkejo. Senfina kovrilo blanka sur la stratoj, sur la urbo, en la tuta imperio. Ĉie nur unu koloro — blanka neĝo.

La ponto estas nia fier'.  
Antaŭe ja estis granda mizer',  
Kiam veturis la prama boaf';  
Laudiĝis kelka malbenad',  
Se dum la sankta nokto mi sidis  
En pramista domo, — li ridis —  
Vidante la lumojn de l' hejm', devis resti  
Mi tie kaj povis helme ne esti.“

Francujo.

Lyon. Fondigis nova societo de gejunuloj, „Stela Klubo Esperantista kaj Literatura“, kies celoj estas: 1. Studo de esp. literaturo kaj de fremdaj literaturoj per Esp. 2. Propagando de Esp. inter la intelekta gejunularo kaj precipe inter la studentoj. Kunvenoj vendrede vesp. ĉe Lyona Beltristika Fakultato; s-o Ehrhard, dekano de tiu fakultato, akceptis la honorprezidon. Prez. estas s-o Ch. Despeyroux, beltristika licencito, kaj sek. s-o J. Dupraz, siud. de la Beltristika Fakultato. „Stela Klubo“ akceptos „membros-korrespondantojn“ en ĉiuj landoj, de kiuj neniu kolizio estas petata, sed nur literatura kontribuo. Adreso: s-o Joannès Dupraz, étudiant, Faculté des Lettres, Lyon.

Zamenhof-solenojn aranĝis la Grupo Esperantista de Lyon la 16. 12. kaj „Stela Klubo“ la 19. 12. Malakoff (antaŭurbo de Paris). La loka popola lernejo oficiale enkondukis Esp. jam antaŭ kelka tempo. La 9. 12. okazis pro. vespero. Paroladis profesoro de loka liceo, krome s-oj Eyquem kaj Delanoue. La profesoro uzis spritan argumenton kontraŭ latino, nome ke oni ne povas traduki en latinon sekvanian frazon: „Mi metas mian poŝtukon en la poŝon de mia pantalono.“ Kompreneble ĉar la romanoj havis nek poŝtukon nek poŝon nek pantalonon — diris la oratoro ĉe la ridego de la publiko. Ĉeestantaj: angla, nederlanda, hungara kaj ĉeĥa samideanoj pruvus la taŭgcon de Esp.

(Laŭ raportoj de J. Major.)

Toulouse. Matenesto memore je Zamenhof okazis la 14. 12.; prezidis kom. Cauillie; ĉeestis s-o Beaulm kun germanoj, s-o Llech el Perpignan kaj s-o Roy, dir. de La Caravane, el Galliac. Oni paroladis, monologis, kantis, dancis kaj fotografis.

Germanujo.

Berlin. Tre vigla movado. Post favoraj artikoloj en la plej gravaj ĵurnaloj (Berliner Tageblatt, k. a.) kaj post la favora sintenado de la radio-stacioj Voxhaus kaj Königswusterhausen la intereso kreskas ĉiutage. Du mondkonataj entreprenoj: AEG-Deutsche Werke, kaj Mittel-europäisches Reisebüro (Meziŝropa Vojaĝoficejo) kun pli ol 200 filioj en la tuta mondo, aliĝis al UEA kaj mendis anonconojn por ET. „Esperanto“ kaj ĵarlibro de UEA. — La favoraj artikoloj de „Berliner Börsen-Courier“, ĵurnalo de financistoj, kaŭzis decidon de Disconto-Gesellschaft (grand-banko) rekomendi studadon de Esp. al siaj oficistoj. Oni povas esperi, ke la bona atmosfero, nun reganta en Berlin pro nia movado, baldai disvastiĝos ira tuta Germanujo; tio dependos grandparte de la demando, ĉu la germanaj samideanoj scios lerte utiligi la sukcesojn atingitajn en la ĉefurbo.

Bremen. Generalkunveno de „Vendreda Klubo“. Oni elektis por venonta ĵaro: prez. D-o C. Renken, sek. s-o H. Barkhausen kaj kas. s-o H. Keller. Kunvenoj je la unua lundo de ĉiu monato ĉe la prez. Auf den Häfen 26, kaj je la tria lundo en Jacobi-Halle, Jacobiŝirĥhof, vespere de 8—10 h. Adreso: H. Barkhausen, Bremen 9, Fliegenstr. 11.

Duisburg. Kurso en Kath. Gesellenverein (Katolika Ĵunnetista Societo) kun 9 p., gvid. s-ano Goppel.

Italujo.

Torino. 4. 12. prop. parolado de adv. Giani, Dir. de Esp. Instituto pro Piemonto, en salonego de Kùrn. Cambro. La oratoro prezitis al multnombra publiko Kom. Prof. Randa, estro de publ. instruado por Piemonto. Loka ĵurnalo „La Stampa“ raportis favore, kaj la sekvintan tagon oni malfermis publikan kurson en komunuma lernejo Pacchiotti, gvid. s-ano Br. Morri. F.R.

Tutmonda Esp. Ligo Forvoĵista estas fondita dum la XVI-a; estro inspektoro Steiner, Bisamberg apud Wien, Aŭstrio. La oficiala organo estas „Aŭstria Esperantisto“, Korneuburg, Aŭstrio, kiu samtempe estas oficiala organo de „Universala Esp. Pacifista Ligo“. Fervojistoj tutmondaj aliĝu.

(Dm. de red.) Nur nun, fine de decembro, ni ricevus ĉi-supran informon! Ĉetero ni devas esprimi nian miron, kiel nacia esp. gazeto povas esti la oficiala organo de universala ligo! Per ĉi tiu ni volas tamen nenion skribi kontraŭ „Aŭstria Esperantisto“, kies ĵus aperinta decembra numero estas tre interesa.

specialaj desiru en tutan landon. Zorgu pri la gubernioj malpuraj de polaj hundoj, flaj judoj! Sufoku eĉ suĉinfanojn... Homformuloj soldatvestaj. Bestigitaj per drinkigo. (Vodka.) Duobla porcio... Vipokrako, pafoj, voĵ. Longbarbuloj, infanetoj mortigitaj per pafiloj. Sur la neĝo sango fluas. Senfina gitaro ruĝa sur la stratoj, sur la urbo, en la tuta imperio. Ĉe nur unu koloro... ruĝa sango.

15 decembro. Nokte... Super rusa imperio vaste blanka, vaste sanga — ŝvebas larĝa ĉielbluo. Milde hela, blankeblua. — Kaj ekbrilas kaj ekiras paca stelo sur ĉielo. Sur la tapiŝon ĉielan strion pentras dia stelo. Strion longan, ore verdan, ame brilan. Sankta stelo marŝas, marŝas. Fine haltas ĉe urbeta Bjalystok. Sube eta, simpla domo. Kun malriĉa familio. Lulilo de novnaskito. Deveninta el la gento de Davido...

Ce lulilo de l' ideto ame staras barba patro. En la lito la patrino. Ekdorminta post la nasko. En dolĉa-mala sono febra. Kaj ŝi vidas en vizio stan fileton kreskantan. Virigintan. Farigintan kuraciston. Savanto de malsanuloj... Redonanta vidon al la homoj blindaj. Vidiganta la okulojn, malfermantan horizontojn. Al animaj mifopuloj. Paciganta malmalkojn diversgentajn, diverssentajn... Grandan dozon da homamo disdonanta al aliaj. Homiganta homnomojn, kaj semanta dian pacon...

Kaj en la noktan trankvilon nun miksiĝas stranga bruo. Soldataro sur ĉevaloj rapide proksimiĝantaj. Al direkto de dometo prilumita. De brila stela radiaro. Jen miraklo... Brila stelo mallumiĝas. Eta domo iĝas nigra. Prikasita per senluma, densa nokto. Longbarba patro zorge-time aŭskultas eksteran bruon. Vipokrako,

Bibliografio.

Libroj, propagandiloj ktp.

Aventuroj de malsperulo. (Fragmento de la verko.) De Robert Reibel. Esperantigis D-o Tobias Sigel laŭ komisiono de Esperanto Office of Detroit, Inc. Detroit, Mich. (U. S. A.) 1924 Esperanto-eldonejo Ellerstiek & Borel G. m. b. H. Berlin kaj Dresden. 15 : 18. 32 paĝoj. Prezo 1.20 ornm.

„Jen perlo el la postlasita trezoro de mia mortinta amiko Robert Reibel!“ Tiel la iradukinto diras en la antaŭparolo. — Pere de ĝi oni ekkonu la vojon, kiun iris enmilita homo, fariginta liberpensulo el kredema kristano. R. R. estis la plej kapabla kaj la plej kuraga poeto, verkisto kaj vojaĝista oratoro de sia epoko. Li superis per siaj verkoj ĉiujn samepokulojn en Usono, haviginte al si famon kaj influante ankoraŭ nuntempe rondojn, kiun la sorto favorigis per persona aŭ perverkara konatiĝo kun li dum lia vivo.

Ci tiu mallonga elĉerpaĵo konigas la leganton pri la ĵurnara eminentulo kaj lia batalado al vivo. H. D.

La Pan-Eŭropa Manifesto. De R. N. Coudenhove-Kalergi. Trad. Dep. Edm. Sds. — 16 pg. kaj kovrilto. Eldonejo Paul Knepler, Wien i. Lichtenst. l. Prezo 0.50 sv. fk. Tiu ĉi broŝuro montras al ĉiu eŭropano la grandajn danĝerojn, kiuj minacas Eŭropon pro ĝia malmuneco: periga milito de l' esonteco, subigo per Ruslando kaj ekonomia ruino. Sola savo el la katastrofo estas la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo (Pan-Eŭropo) t. e. tuta Eŭropo sen la brita kaj rusa imperioj, kun kiuj Pan-Eŭropo tamen povas vivi en paco. Sur la lasta paĝo de la kovrilto troviĝas mondkarto por montri la amplekson de Pan-Eŭropo kompare kun la tutmondo. Ĉiu legos la broŝuron kun granda intereso. T. J.

Esperantuja Kanto. Teksto de Cath. J. Roskes-Dirksen muziko de Hugo Nolthenius. Havelba pro 0.20 hfl (0.40 sv. fk.) de s-ino Cath. J. Roskes-Dirksen, Haag, Nederl., Anemoonstr. 96.

Oni povas saluti tiun horalsimilan kanton kun fortepiana akompano kiel ĝojigan prilirigon de nia originala kantiliteraturo. La malalta prezo ebligas la aĉeton al ĉiu grupo. R. ano.

Zorgegu pri la infanoj. Flugfolio en Esp. 5-a eldono. Havelba de s-o J. Bredal, 5 Birdhurst Road, Croydon, Surrey, Brii.

Esp. gazetoj.

Int. Medicina Revuo, 1924, n-o 6. Adreso: Budapeŝt 6, Teréz-körút 6.  
Sennaciulo, 8. 12. Adreso: Leipzig-Stötteritz, Colmstr. 1. France-Esperanto, dec. Laŭ sciigo de la redakcio ĉi tiu numero estas la lasta; post ĝi F.-E. ne plu aperos.  
La Progreso, nov. Adreso: Praha 7, Sochaŝka 353. Kun ilustraĵoj laŭ pentraĵoj de J. Burghauerová.  
Germana Esperantisto, dec. Adreso: Berlin SW 61, Wilmsstr. 5. Pliampleksiĝis de 24 al 32 paĝoj.  
Amerika Esperantisto, okt.-nov. Adreso: 507, Pierce Bldg., Copley Square, Boston 17, Mass.  
Jl. Spec ĵulista (kristnaska) n-o de Svenska Arbetar-Esperantisten.

Holanda Esperantisto, 20. 12. (triobla n-o 154-156). Adreso: 1. Sweelinckstr. 19-2, Amsterdam. Havas nun 802 abonantojn.

Aŭstria Esperantisto, dec. Adreso: Korneuburg kaj Wien, Hovenegasse 12-2-15. Kun interesa ilustr. art. „Centjara evoluo de la aŭstriaĵ fervojoj“

Literatura Mondo, dec. Adreso: Budapeŝt 6, Eötvös u. 5. Estas bedaŭrinde, ke apenaŭ 500 esperantistoj abonas ĉi tiu bonan lit kaj artan revuon. La dec. n-o havas artan filialan ilustraĵon de vintra parko. La enhavu konsistas en literaturoj kaj artikoloj de diversnaciaj aŭtoroj, notoj de siberia lukanto kaj belaj reprodukt-ajoj de aŭstra pentristo Peitenkofen.

Car ne estas eble por ni respondi al ĉiu aparte, ni kore dankas al ĉiuj esperantistoj kaj esperantaj institucioj pro la kondolencoj ricevitaj de ni okaze de la morto de nia kara patrino.  
Sofio, Adam, Lidio Zamenhof.

Gazetaro.

The Shin-Aici, Nagoja, Jap., 10. 11. Granda japanlingva ĵurnalo enhavas div. artikolojn en Esp.  
Eugenia, Barcelona, dec. Art. pri 4-a kongr. de SAT.  
Hudikvalls Nyheter, Sved, 13. 12. Art. pri ET resp.  
Heroldo de Esp.  
Der Deutsche Rundfunk, Berlin, 21. 12. Menciono de la esp. aranĝoj en la programoj de la germ. radiostacioj.  
Hofer Anzeiger, Hof, Germ., 15. 12. Art. pri Esp.  
Rheinischer Anzeiger, Krefeld, Germ., enhavis dum oktobro kaj novembro 22 art. pri esp. movado.  
Reichenberger Zeitung 16. 11. Pariza Komerca Ĉambro. — 22. 27. 11.; 4, 11. 12. Ĉiuj pri radioparoladoj en Esp.  
Freigeist, Reichenberg, 12. 12. Esp. angulo.  
Teplitz-Schönaauer Anzeiger, 22. 11. esp. leciono.

Libera tribuno.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale esprimataj ĉiuj sciigoj, informoj, kritikoj, liberej vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin iun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi netaĝajn artikolojn.

280. Rilatas al 276 kaj 277.

En ET 277 proponis samideanoj skribi la proprajn nomojn laŭelparole. Tio estas tre ĝusta. Sed oni ne forgesu la malagrablajn konsekvencojn. Se iu, ekzemple, skribas sur karto „Varŝava“, la poŝtoficejo certe ne scias, ke tio signifas Warszawa. Se oni skribas „Al s-o Sinke“ (anstatuŝ Sinke), la poŝtoficejo portas la leteron al iu s-o Sinke, kiu eble ankaŭ ekzistas. Skribante la nomon Rousseau — „Ruso“, oni pensas, ke tio signifas loganton en Rusujo ktp. La sola eblico estas do laŭ mia opinio, ke oni skribu (en gazetoj ktp.) la nomon laŭ la nacia lingvo kaj laŭ esp. elparolo. Tiamaniere: Warszawa (Varŝava), Rousseau (Ruso) ktp.

Stud. ĵur. Ewald Janischowsky, Breslau.

281. Eluzu la afrankon!

Multaj gekorespondantoj ne eluzas sufiĉe la multekostan afrankon, skribante nur kelkajn vortojn, kvankam la korespond-petanto ofte por instrui celoj deziras ampleksajn sciigojn pri personoj, lokoj, landoj, sociaj k. a. cirkonstancoj. Ĉiu pripensu, kiel malfacile la esperantistoj konvinkos la neesperantistojn pri la admirdinda uzado de la instruanto tian donacon, konsistantan en bildkarto, leteroj, poŝtmarko, por havi okazon respondi kaj korespondi.  
R. Schönwälder, Hermansseifen.

Leterkesto.

A. W. en S. Ne provu trompi la poŝton! Vi gulis sur vian leteron jam uzitajn poŝtmarkojn; tial ni devis punpagi 0.20 mk.  
K. S. en Graz. La itea poŝto evidente ne scias la tarilon. Ni afrankis nepre sufiĉe.  
F. lino A. S. en L. Dankon por afabia karto! Agrablajn festotagojn!  
Poŝtabonantoj en Helmstedt kaj Xanten. Vi forgesis skribi al ni vian adreson. Sendu ĝin tuj!  
Al multaj. Por prezenti al nia legataro plejeble kompletan Kronikon, ni deziras plejble multajn raportojn; sed ili estu koncizaj: datoj, nomoj (tre klare skribitaj!) kaj nombroj, — ĉio cetera ne multe interesas.

Poŝtabono ekster Germanujo.

Ekzistas poŝtoficejoj asertantaj, ke „Esperanto Triumfonta“ resp „Heroldo de Esperanto“ ne estas abonebla ĉe ili, kaj ke ĝi ne troviĝas en la gazeta listo. Ni konfirmas ĉi tie, ke tia aserto de poŝticejoj estas malvera. Plej bona pruvo por tio estas, ke ni jam havas poŝtabonantojn en multaj landoj. Do, se unu poŝt- oficejo trovas nian ĵurnalon en la listo, kial ne ankaŭ alia ĝin povus trovi? La koncernaj oficistoj devas nur atente rigardi, kaj ili certe trovos. Eventuale oni indiku, ĉe mendo, ambaŭ titolojn, la malnovan „Esperanto Triumfonta“ kaj la novan „Heroldo de Esperanto“; sed oni rajtas postuli, ke la poŝticejo akceptu la abonmendon.

Protesto.

En ET 210 ni legis pri projektita organizo de la 17-a Universala Kongreso Esperantista en Svislando. Konforme al tio ni opinias necese komuniki al la tutmonda esperantistaro nian proteston.  
Dum 1925 sovetlandaj esperantistoj partoprenis la Universalan Kongreson de Esperantistoj kaj sukcesis fari kelkajn intertraktojn pri komuna agado. Same en 1924 la Kongreson ĉeestis reprezentanto de C. K. de S. E. U.  
Dum la proksima 17-a Kongreso ni intencis fari kelkajn proponojn pri internacia plifirmigo de niaj reciprokaj rilatoj diversspecaj sur la bazo de apliko kaj uzo de la lingvo neŭtrale internacia.

Organizo de 17-a Kongreso sur svisa teritorio malhelpos al niaj delegitoj ĉeesti tiun Kongreson, kaj verŝajne la organizantoj de la internacia Esperanto-movado tion bone scias.  
Dum la lasta kunsido de 15-a Kongreso s-o Privat laŭte deklaris, ke 16-a Kongreso estos organizata tiamaniere, ke ĉiuj reprezentantoj de ĉiuj popoloj kaj landoj povu ĝin ĉeesti.

Ni ne intencas kontraŭstari al ŝanĝo de tiu deklaro. La Kongreso „neŭtrala“ povas okazi dum 1925 en Svislando, sed tiuokaze ni opinias ke estos pli ĝuste ĝin nomi ne neŭtrala kaj ne universala internacia kongreso, sed kongreso universala de la landoj kapitalistaj.

Ajnokaze tiun kongreson en la lando, kie ne povas esti garantiata per la ekzistanta sociordo kaj ekzistanta leĝoj vivo kaj sekureco por la sovetaj civitanoj, partoprenos nek unu sovetlandano nek unu reprezentanto de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo, kiu unuiĝas esperantistojn de ĉiuj sovetaj respublikoj, ampleksantaj sesonon de la tutmondo.

Kun salutoj esperantistaj por C. K. de S. E. U. Jakovlev, Prez. de C. K.

pafilpafo... Pluenpasis la kozakoj! — Dank al Dio... \*

Super lulilo bjalystoka jen la stelo ree brilas. Sendas benan radiaron suben al la novnaskito. Blanke pura, senmakula novnaskito bone dormas. Nesciantie pri suferoj, sinoferoj...

Kaj super rusa imperio vaste blanka, vaste sanga, dia stelo disradias mildan lumon. Mildan lumon ore verdan. Kien radioj penetras, beno ĝermas. La suferoj forgesiĝas. Kaj la homoj eksonĝas pri dolĉa paco. Ne nur en la rusa lando. Sur kvin partoj de la tero... Sub kvinpinta paco-stelo...

Nia konkurso n-o 1. Esperanto renversita.

En la pasinta numero ni komencis la publikigon de artikolo. Sed post la kompostado de la teksto nia lernanto Karlĉjo havis la mallertan renvers la kompostadon. Por ke oni ne rimarku lian mallertadon, ni ree kunmetis la literojn de ĉiu vorto, sed laŭ neĝusta sinsekvo. Por legantoj, kiuj sukcesos rearanĝi la literojn laŭ ĝusta sinsekvo, ni starigis premiojn. La artikolo aperos ĉi post ion, ĉiujfoje po unu frazo. Por novaj abonantoj ni ripetis la jam aperintan frazon. Je la fino de la publikigo oni sendu la solvon de la tuta artikolo. La premioj estas: 1. Senpaga jarabono al „Heroldo de Esperanto“, 2. luksa, tole bindita ekzemplero de „Tragedio de Homo“, la plej bela libro en Esperanto, 3.—5 tri kvaronjaraj abonoj al „Heroldo de Esperanto“, 6.—10. libroj simplaj.

La unua kaj dua frazoj. Iuĉ turkuloncina ahsva atorn terzagano. Ĉe jelp aaalngnd iauturkij looppo podasse lpi lpijam ad gĉajuiat jjarolun rpo rimofin ins rip katjalua eddajjun.

Kvinpinta stelo por unu tranĉo.

En la klarigo donita en ET 226 mankas unu frazo ĉe Fig. 3: Preninte la supran maldekstran angulon (c) antaŭen kaj metinte ĝin sur linion b—a (en punkto e), laŭ Fig. 2, oni devas ankoraŭ faldi la dekstran angulon (b) malantaŭen. Poste oni faldos la paperon laŭ linio d—g ktp.

1) Brando.

Esperanta Ligilo

la lumo de niaj senvidaj gefratoj.

Sindonaj gesamideanoj, dum pia krisnaska festo, memorante la naskigon de nia Savinto, lumiganto de la humiluloj, lumigu la koron de niaj senvidaj gefratoj.

Dankeme akceptas oferojn: Honora Kasisto de „Esperanta Ligilo“: S-o W. P. Merrick, Penso, Shepperton, Anglujo, aŭ la Redakcio de ET.

14-a Germana Esperanto-Kongreso en Magdeburg.

Al parto de la hodiaŭa numero estas aldonita Aliĝilo por la 14-a Germana Esp Kongreso en Magdeburg. Ni atentigas speciale, ke (ĝis 1.1.1925) la kotizo estas mk. 5.—, por samfamilianoj mk. 3.—.

Komerca Instituto „Esperanto“ Jägerndorf (Ĉeĥosl.)

liveras ĉiuspecajn ornamaĵojn, silkajn pentraĵojn ktp.

Du allogaj esperantaĵoj.

- a) 4 ĉarmaj kantoj en Esperanto kaj angla lingvo, kun muziko kaj fortepiana akompanado. Grandformataj 8 paĝoj. 1/— afrankite.
b) Struvelpetro, kun 24 koloritaj bildoj kaj versoj en Esperanto. 2/— afrankite.

Revendistoj ricevas rabaton.

J. D. Appiebaum, Liverpool, Anglujo 11 Mayville Rd., Mossley Hill.

Rekomendata de la XVI-a Universala Kongreso de Esperanto.

La eldonon de la sola arta literatura monata esperanta revuo

Literatura Mondo

transprenis:

Hungara Esperanto-Instituto, Budapest VI Eötvös-u. 3.

Ĉiu grupo kaj literaturamanto nepre helpu la gazeton per abono kaj disvastigo. Po ekzemplero: 12000 hung. kronoj (0,70 ŝilingo).

Kunlaborantoj: la plej konataj esperantaj verkistoj el ĉiuj landoj.

Vi devas subteni nian solan literaturan revuon!

Anoncetoj.

Anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 30 vortoj egalvaloron de 1,80 sv. fk. — Anoncetoj pri korespondado kaj interŝanĝo kostas po du enpresoj kaj po 15 vortoj (krom unu adreso) egalvaloron de 1,20 sv. fk. — Anoncetoj pri esperantista vivo (naskigo, fianĉigo, edziĝo, morto, okazonta grava esp. kunveno, paroladoj, festoj k. s.) estas senpagaj (unufolia enpresoj). — Anoncetoj devas alveni 8 tagojn antaŭ aperado.

NASKIĜO. Al ges-anoj Dolce en Udine, Ital., naskiĝis la 14. 12. filieto nomita Gian-Luoro.

FIANĈIGO. Dum la Kristnaskofesto fianĉigos F-lino Emmy Schubert el Watsenschied (Vestfalia, Germ.) kaj s-ano Adolf Schnepel el Duisburg.

EDZIĜO. La 26. 12. geedziĝos s-ano Ince Čače en Riga kaj F-lino Pauline Kalnina en Nurmizos. Gratulon! [1] MI PERDIS la adreson de F-lino Elmi Tamminen loĝanta en Helsinko, Finnlando. Kiel rekompencan mi sendos al tiu, kiu sciigos al mi ŝian adreson, kelkajn belajn il. PK de mia urbo. F. Bläsing, Burgsteinfurt (Germ.), Leerstr. 11. [2]

GRAVA ENKETO. Kiuj ses libroj estas laŭ vi la plej bonaj kaj belaj? kaj kial? La respondantoj bonvolu aldoni sian adreson kaj metlon al s-o J. Munter, Klundert, Holland. [3]

GRAFologio! Klaraj juĝoj de la kapablecoj psikaj estas projektataj per P. Beier, Ottendorf ĉe Greiffenberg, Germanujo. Esperanta, germana, angla, hispana korespondado. Honorario: 1 marko aŭ egalvaloro. [5]

LETERVESPEROJN aranĝos la 29. 1. kaj la 12. 2. 25 la esp. grupo Syke. Eksterlandaj gesamideanoj bonvolu sendi il. PK, L, PM ktp. por nia propaganda vespero al Heino Lange, Syke apud Bremen, Bassumerstr. 151. Respondo garantiata. [2]

HELPU BONKORULOJ! Mi havas en manuskripto grandan originalan romanon „Sen filoto“, kiu mi cedos malkare al ĉiu, kiu helpos al mi mone daŭrigi edukadon de miaj infanoj en la urbo. Skribu al J. Širjaev, Baklanka, gub. de Vologda, Rusujo. [1]

LETERVESPERON aranĝos la Germana Esperanto Societo Reichenberg, Ĉeĥoslovakio. la 16. 1. 1925 por propaganda celo kaj petas ĉiujn eksterlandajn gekorespondemulojn je il. PK kun marko bildflanke. La dua Letervespero okazos la 5. 3. 1925, ĉar ni atendas ankaŭ sendaĵojn el transoceana landoj. Ni intencas per sukcesonta letervespero interesiĝi precipe filatelitojn. Helpu al ni! Ni rekompencos per belaj vidarkartoĵoj kun esp. surpriso. [5]

PROPAGANDO. S-o Frans Albert Quist, Brunnsviks Folkhögskola (popolaltlernejo), provinco: Dalarna, lando: Svedujo, deziras nepre ricevi belegajn kartojn, litojn kaj personajn fotografiaĵojn de gesamideanoj en tuta mondo por esp. propagando je fama sveda popolaltlernejo. Tial mi petas kore, ke gesamideanoj en Azio, Afriko, Ameriko kaj Aŭstralio bonvolu sendi kartojn kaj helpi min je tiu ĉi grava afero. Vi tiel faros al nia nobla movado grandan servon. Konsekvence: Gesamideanoj, skribu al la lando, kie la noktimeza suno brilas kaj la nordlumo flamas, sed skribu baldaŭ, skribu tuj! [2]

Korespondado kaj interŝanĝo.

S-ano Violdo Miĥalski, Varsovio, Polujo, str. Ĉerniakowska 225-79, deziras korespondi per L kaj PK kun ĉiuj landoj. Certe kaj nepre respondos al ĉiuj, kiuj skribos. [2]

S-o Wilhelmo Biller, horlogisto, Berching i. Opf. (Bavarujo) Germanujo deziras korespondi kun la tuta mondo per il. PK kaj L. Mi interŝanĝos kaj kolektas precipe il. PK kaj fotografiaĵojn de miaj korespondantoj. Mi respondas kaj sendas ĉiam kaj tuj. [2]

S-o Debarbieri Guglielmo, Via Casarega, 55, Genova, Italujo, deziras interŝanĝi PM kun gesamideanoj de la tuta mondo. [2]

S-ino Helena Czechowska, Polujo, Boryslaw, deziras interŝanĝi kun ĉiulandanoj artbildojn, pentraĵojn. Presaĵoj ne pli karaj ol 30 poŝikartoj afrankaj. Samvalora sendo tuj. [5]

Filatelitoj atentu! En Nederlando estas eldonataj tri poŝtmarkoj por protektado de nezorgitaj infanoj. Prezoj: hfl. 0,04, 0,11, 0,12 1/2. Sendu monon rekomendite antaŭ la 15. 1. 1925. Ĉiun mendon mi honeste prizorgos sen ia profito. C. Govers, del. UEA, Steengracht 21, Helder, Nederlando. [2]

S-o Josef Purmann, Tschernina 105, ĉe Arnau, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi per il. PK kaj L kun la tuta mondo. Mi respondos ĉiam. [2]

S-o Anton Peikert, Arnau 211, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kun la tuta mondo per il. PK kaj L. Mi ĉiam respondos. [2]

S-o Kaarlo Orjanne, Finnlando, Koliola as. (ĉe Viipuri) deziras korespondadon kun ĉiulandaj samideanoj per il. PK pri la temo artoj. [2]

S-o Tolman Karel, instruisto, Praha-Smichov, Zatlanska 1550, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi PM kun la tuta mondo. [2]

S-o Jan Ev. Slávek, oficisto, Praha-Zizkov, Chodská 14, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi il. PK, ev. PM, L kun tuta mondo. Mi respondos ĉiam. [2]

S-o Kurt Lösch, Chemnitz, Annabergerstr. 110, Germanujo deziras interŝanĝi il. PK kaj gazetojn kaj ĉiuj landoj M. sendos nur belajn PK. Ĉiuj tuj ricevos respondon. [1]

Maksimiliano Ziemek, Krakow, Polujo, strato de Vincentego Pola 5, deziras korespondadi kun ĉiulandanoj per il. PK, L pri scienco, ideo, esperanta movado, observo, interŝanĝi PK, PM fotografiaĵojn, papermonon k. a. Respondo certa. [2]

S-o Franz Petter, Falkenau-Kittlitz n-o 21, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi L, PK, PM escepte kun germanoj. [1]

S-o Josefo Kuszyński, Varsovio, str. Mariensztadt n-o 6, Polujo, deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo per il. PK kaj L pri diversaj temoj. [2]

Fraŭlo, poŝtoficisto, 21 jara, deziras interŝanĝi per il. PK kaj L kun gesamideanoj. Bonvolu skribi, nepre respondu! Latvio, Rujene, Pasta Kantori, Jaunbrat. [1]

Heilbronn a. N. (Germ.) La Esp. grupo serĉas ankoraŭ kelkajn gekorespondantojn el ĉiuj landoj. Ĉiam kaj tuj respondos: il. PK bl. Oni turnu sin al la prezidanto s-o Fr. Bachmann, Bahnhofstr. 5-1, Heilbronn a. N. (Germ.). [2]

F-lino deziras korespondi per il. PK kun ĉiuj landoj. Preferas negermanlingvanon. Julia Zimmer, Wien II, Schreygasse 8 (Vieno, Aŭstrio). [1]

S-o Ruda Ventura deziras korespondadi kaj interŝanĝi PK, L kun seriozaj gesamideanoj de ĉiuj landoj. Certe respondos. Ruda Ventura, Letina apud Pizeĵ, post Lobež [1]

F-lino Jara Brandys, Praha-Smichov, Ĉeĥoslovakio Holečková 668-45, deziras korespondi kaj interŝanĝi PK kun tuta mondo. [1]

S-o Seitaro Matsuba, Tanabe Kii, Japanujo, deziras korespondi kun esperantistoj kaj esperantistinojn en la tuta mondo, speciale kun geinstruistoj kaj profesoroj. [1]

Estimataj Samideanoj! Bonvolu sciigi, ke de nun mia nova adreso estas: Győr, Apádfürcs 3, Hungarujo, Georgo Steiner. [1]

S-o Theodor Matthiae, Bochum, Wiemelhauserstr. 24, Germanujo, deziras korespondi il. PK, L kaj interŝanĝi PM kun gesamideanoj al la tuta mondo. [1]

Atentu filatelitoj! Se vi interŝanĝas pri la belegaj poŝtmarkoj de la libera urbo Danzig, tuj turnu vin al mi! Mi preskaŭ donacas ilin al vi. 100 diversajn danzigajn PM, kies kataloga valoro estas 6. 18 sv. fk., mi liveras kontraŭ 3 sv. fk. aŭ samvaloro. 125 diversajn danzigajn PM (kataloga valoro 6. 25 sv. fk.) kontraŭ 1 dolaro aŭ samvaloro. Ĉiuj PM laŭdezire stampitaj aŭ neuzitaj. Por poŝtelspezoj (rekomend-litero) donu 2 resp. 3 sv. fk. aŭ samvaloron. Adalbert Noch, Danzig, Johannisgasse 67. [1]

F-lino Irena Petrauskaitė deziras korespondi kun la tuta mondo. Joniškėlis, Biržu ap., Litovujo. [1]

S-o Josefo Prouza, Čakovice 29 u. Prahaj, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondadi kun tutmondaj samideanoj kaj precipe interŝanĝi PM kaj vidarkartojn. Ĉiam respondas. [1]

Anoj de Esperanto-grupo Eichwald apud Teplý-Schönau (Ĉeĥoslovakio) deziras interŝanĝi il. PK (bil.). Respondos certe. F-linoj Karla Adam n-o 181, Mitzi Adam n-o 181, Anna Müller n-o 282, Milli Moulia n-o 299, Rea Schuster n-o 212, s-oj Richard Schulze 164, Marlin Bellmann, Mühlstr. 50. [1]

Mi deziras interŝanĝon de PM kun ĉiuj landoj de mondo. Interŝanĝe proponas tutan Persujon. Bazo por interŝanĝo „Yvert et Teller 1925“. Duplikatojn ne akceptas, ĉiam respondas. preferas konstantan interŝanĝon. Adreso: S-o D-o B. Korona, Banko Ruspers, Teheran (Persujo). [2]

Ĉiu esperantisto nepre havigu al si la specialan Esperanto-skribmaŝinon

MIGNON

Ĝi ebligas ŝanĝon de la tiparo por ĉiu aĵn lingvo de la mondo dum kelkaj minutoj. La plej nova modelo de malnova sistemo. Rapide lernebla! Modera prezo! Prezo 140 gmk. (175 sv. fk.).

Skribu tuj esperanté al

AEG-Deutsche Werke Berlin W66, Mauerstr. 83-84

Entreprene de UEA.

Mi estas aĉetanto

de aveno hordeo ostoj kornoj vagon- aŭ ŝipliveradoj. Ofertojn kun specimenoj sendu al

Komercentrepreno Dubach, Bissohe-Lugano (Svislando).

Gvidlibro tra Salzburg.

Tiu ĉi ilustrita 52-paĝa broŝuro sciigas pri la vidindaĵoj de la famkonata Mozart-urbo kaj pri la naturaj mirindaĵoj de la ĉarma alp-londeto Salzburg kaj enhavas notojn pri la disvastigo de Esperanto en ĝi.

Mendebla ĉe

Ellersiek & Borel, Berlin S. W. 61.

Prezo: 50 feniĝoj.

Pensio Erika Tschierschen apud Chur

(Svislando).

Vintra restado je malgrandaj prezoj kaj bonega nutraĵo. - Ski-ekskursoj, glitejo.

Jakob Wiesner.